

Eŭropa Bulteno

Novembro 2008, № 11 (76)



Avo Frosto respondas en Esperanto!

Kristnasko-2008 baldaŭ alvenas kaj plurcentmiloj da infanoj en la tuta mondo skribos al Avo Frosto. Jam delonge, Avo Frosto kutimas respondi en la franca, la angla kaj en dudeko da aliaj lingvoj sed ekde 2002, la norda saĝulo ankaŭ lernis Esperanton.

Ni invitas ĉiujn esperantistojn, junajn kaj junkorajn, malkovri tiun ĉi tradicion skribante al Avo Frosto. Simple sendu manskribitan leteron al la adreso:

Avo Frosto,
Norda Poluso,
Kanado, Canada
HOH OHO

Avo Frosto preferas manskribitajn leterojn, eĉ se skribitaj de etaj manoj kiuj lernas skribi. Ne forgesu **klare skribi vian nomon kaj adreson** por certigi ricevon de respondo. Krome, indiku klare, ke la letero estas en Esperanto ĉar la helpantaj koboldoj ne ĉiam rekonas pri kiu lingvo temas.

La poŝta kodo estas vera kaj grava parto de la adreso. Ĝi estas rezervita al Avo Frosto.

Normando Fleury

koboldo por la Kanada Poŝta servo



KONFERENCO DE EEU: DULINGVA KAJ MULTLINGVA EDUKADO

LA MAISON DES ASSOCIATIONS INTERNATIONALES (MAI), BRUSELO
RUE WASHINGTON 40
MEREKREDO, la 10-an de DECEMBRO 2008

CELO: Interŝanĝo de spertoj pri praktikaj aspektoj de dulingva kaj multlingva edukado kun emfazo je praktiko

LOKO: La Maison des Association Internationales (MAI), Rue Washington 40, 1050 Bruselo

TEMPO: Komenco 9:30/10:00; Tagmanĝopaŭzo 13:00-14:30; Fino ĉirkaŭ la 18:00 h

PROGRAMO: Antaŭtagmeze: Lerneaj aspektoj de dulingva kaj multlingva edukado
Posttagmeze: Familiaj kaj aliaj eksterlerneaj aspektoj

LABORLINGVOJ: angla, esperanto, franca



PROGRAMO

Enkonduko kaj salutoj:

Ljudmila Novak (MEP) kaj Seán Ó Riain (prezidanto de EEU)

Antaŭtagmeza sesio:

Profesoro David Marsh, Universitato en Jyväskylä (Finlando)

Profesoro Wim Jansen, Universitato en Amsterdam (Nederlando)

Marc Demonty, instruisto pri nedelanda, angla kaj germana lingvoj (Belgio)

Johan Haggman, membro de Kabineto de Komisionano Leonard Orban (Belgio)

Seán Ó Riain, taskigito pri irlanda lingvo en Eŭropa Komisiono (Irlando)

Kristin Tytgat, Erasmushogeschool Bruselo, Departamento pri aplikita lingvistiko (Belgio)

Posttagmeza sesio:

Ambasadoro Ulrich Brandenburg, germana ambasadoro ĉe NATO (Germanio)

Angela Tellier, instruistino en eksperimento "Springboard... to languages" (Britio)

Jozef Reinart, ĉefo de la slovak misio en Slovaka ambasado por Belgio kaj Luksemburgo

Zlatko Tišljar, Slovena Instituto por edukado de plenkreskuloj (Slovenio)

Katalin Kovacs, estro de la projekto Edukado.net (Nederlando)

Flory Witdoeckt, entreprenistino (Belgio)

ALIĜILO AL LA KONFERENCO

- Mi aliĝas al la konferenco pri dulingva kaj multlingva edukado
Loko: rue Washington 40; Bruselo; Belgio
Dato: la 10-an de decembro 2008
- Mi pagos konferenckotizon al la konto de EEU
Konferenckotizo: 5 €
UEA-konto: eece-p
Ĉe ING banko: el Belgio: 380-0098148-55
el eksterlando: IBAN: BE31 3800 0981 4855; BIC: BBRUBEBB

Antaŭnomo:	
Familia nomo:	
Adreso:	
Lando:	
Retadreso:	
Telefonnumero:	

Sendu vian aliĝilon al la retadreso: eeu@europa.eu

**ITALAJ ESPERANTISTOJ KAJ NEESPERANTISTOJ
PRI LINGVAJ RAJTOJ**

La 25-an de novembro en Florenco en la historia "Palazzo Vecchio" Itala Esperanto-Federacio aranĝis kunvenon pri Homaj Rajtoj kaj Lingvaj Rajtoj. Temis tre verŝajne pri la plej solena okazaĵo dum la jaro 2008-a, Internacia Jaro de Lingvoj, aranĝita en Italujo.

La kunveno estis aranĝita de "Esperanto Italia" (alia nomo por IEF) kun lakunlaboro kaj aŭspicioj de Accademia della Crusca (Akademio pri la italalingvo), la Nacia Unesko-komisiono, la urbo Florenco kaj la AccademiaEuroLinguistica-sud (eŭropa asocio de lingvistoj).

Parolis pri "Homaj Rajtoj kaj Lingvaj Rajtoj" la honora prezidanto de "Crusca", Francesco Sabatini, fama itala lingvisto kaj 8 aliaj profesoroj el pluraj italaj kaj svisaj universitatoj.

Estis tuŝitaj pluraj temoj, de la decido de la Tribunalo de EU kontraŭ la decido aperigi anoncojn pri dungado de funkciuloj nur en la angla, franca kaj germana al la rolo de la araba en Unuiĝintaj Nacioj.

Ĉiuj neesperantistoj agnoskis la rolon de Esperanto por protekti lingvajn rajtojn en la kadro de samrajta internacia komunikado.

Renato Corsetti

INTERNACIA SCIENCA SIMPOZIO »ESPERANTO KAJ LA KROATA IDENTECO«

La 7-an kaj 8-an de novembro okazis en Zagreba Filozofia fakultato internacia scienca simpozio »Esperanto kaj la kroata identeco« dediĉita al 100-jariĝo de E-movado en Kroatio (en 1908 estis fondita unua kroata E-societo en Zagrebo). La simpozion organizis Katedro por Germanistiko de la Filozofia fakultato en Zagrebo sub kla gvido de prof. Velimir Piškorec. Dum la du tagoj okazis 23 prelegoj. La plej multaj estis de esperantistoj sed kelkajn prezentis neesperantistaj sciencistoj el Zagrebo. Tiusense la plej interesa kaj laŭ mi la plej valora estis prezento de la enketita esploro pri



interesiĝo pri Esperanto en Zagrebo. La esploron efektivigis helpe de pluraj studentoj Anđel Starčević kaj Renata Geld. La esploro konsistis el pluraj demandoj al kiuj necesis amplekse respondi. Oni enketis 191 homojn kaj dividis ilin al du kategorioj: ĝenerala popolo kaj studentoj. La rezultoj estis surprize pozitivaj. En Zagrebo en la ĝenerala popolo ĉirkaŭ 30% de la homoj scias sufiĉe multe pri Esperanto kaj pretus ĝin lerni. Inter la studentoj la priinformadikaj studentoj tre maklmulte scias (94% nenion scias pri ĝi), dum surprize ne nur ke la studentoj de la angla lingvo 100% scias kio estas Esperanto sed eĉ 65% lernus ĝin. Ekzistas multaj diraĵoj de la enketitoj en la esploro, kiujn indus detale prikosnsideri. Tiu esploro estas tre interesa por ĉiu esperantisto kaj mi esperas ke oni havos ĝin baldaŭ en Esperanta traduko.

Aliaj prelegoj estis tre variaj. Sendube elstaris tiuj de Nikola Rašić pri la signifo por Esperanto de doktoro Dalibor Brozović kaj pri Interlingvistika laboro de Tomo Maretić kaj tiu de Ulrich Lins pri Ivo Lapenna. Istvan Ertl prelegis pri »Limoj de neŭtraleco«. Oni aŭdis multajn interesajn prelegojn pri la historio de E-movado en Kroatio pri uzo de lerniloj en Kroatio, komparo inter Esperanto kaj la rumana kaj aliaj. Mi esperas ke almenaŭ resume eblos baldaŭ havi skribitan libron pri la prezentita materialo.

Dum la simpozio en aŭlo de la Fakultato oni povis vidi imponan filatelian ekspozicion pri E-filatelaĵoj.

Dum la tuta simpozio la prelegoj estis abunde vizititaj de la publiko kaj variis inter 40 kaj 70 partoprenintoj. La simpozion aŭspiciis mem la ŝtatprezidanto de Kroatio Stipe Mesić, kiu sendis salutleteron. Dum la malfermo parolis la dekanano de la fakultato profesoro Jurković kaj la vicdekanano profesoro Boras (kiu parolis en Esperanto). Oni devas danki antaŭ ĉio al profesoro Velimir Piškorec, estro de la germanistika apartaĵo de la fakultato kiu efektive organizis la tuton kaj ankaŭ iniciatis plurajn esplorojn kiujn efektivigis li kaj la kolegoj kaj ankaŭ pluraj studentoj de germanistiko por la simpozio. Lia iniciato estis ankaŭ tio ke nun ĉe germanistiko studentoj interalie aŭskultas la studobjekton pri interlingvistiko kaj esperantologio. Ĉio tio estas rezulto de la fakto ke en Kroatio 100 jarojn kontinue agas esperantuistoj kaj ekde 1929 kiam la unuan fojon estis fondita Studenta Esperanto-klubo agas junaj intelektuloj inter kiuj multaj studis ĉe la Zagreba Filozofia fakultato, gvidis E-kursojn kaj oragnizis multajn E-aranĝojn.

Zlatko Tišljar

EROJ PRI LA ĈI-MONATA AGADO DE EEU

1. La 6-an kaj la 7-an de novembro Jozef Reinart kaj mi ĉeestis kunvenon "English Only" organizita de la Goethe-Institut en Bruselo. Ni sukcesis fari multajn novajn kontaktojn kaj informi pri la agado de EEU, pri la anoncoj de Etsuo Miyoshi kaj pri la Geremek-Grupo en la Eŭropa Parlamento.
2. La 8-an de novembro mi havis duonhoran prelegon en Dublino, pri "La irlanda lingvo kaj Eŭropo - hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ". Kompreneble mi parolis ankaŭ pri Springboard, kaj ĝia ebla kontribuo al plibonigado de la lernado de la irlanda. Mirigis min ke la profesoro de la irlanda lingvo en la universitato de Cork, Alan Titley, ne nur konis Esperanton sed eĉ posedis ekzempleron de la longa kaj belega irlandlingva poemo el la 18a jarcento, "La Noktmeza Kortumo" de Brian Merriman, en Esperanta traduko de Albert Goodheir.
3. La 11-an de novembro Jozef Reinart kaj mi ĉeestis tuttagan kunvenon pri lingva kaj kultura diverseco en Eŭropo organizita de la asocio por diskonigi la italan lingvon, "Assodilit", en Bruselo. Mi povis prezenti Springboard, kaj Jozef informis multajn homojn pri la agado de EEU. Parolis matene Leonard Orban, Komisionano de EU por Plurlingveco, kaj Ĝenerala Direktoro K.J. Loennroth, ĉefo de la tradukservo de la Eŭropa Komisiono. Michael Cwik parolis ankaŭ iom pri niaj ideoj sen mencii la vorton "Esperanto".
4. Maja Tišljär partoprenis 14-15.10. LitCam konferencon, la konferencon pri alfabeteco kiu ĉiujare okazas dum la Frankfurta librofoiro. Ĉi-jare ĝin kunorganizis la Eŭropa Komisiono kaj ĝi okazis sub auspicio de komisionano Leonard Orban. Li fakte nur mallonge parolis ĉe la komenco, sed okazis ankaŭ podia diskutrondo pri la Malouf-raporto kiun ĉeestis du membroj de la grupo kiu verkis la Malouf-raporton kaj estis tre interesa diskuto interalie pri la dominado de la angla. Krome ŝi ĉeestis la laborgrupon dum kiu oni prezentis la rezultojn de la raporto mendita de la Komisiono pri la interkulturaj kompetencoj akirataj dum lingvolernado en lernejoj.
5. Ĵaŭdon, la 20-an de novembro, mi survidbendigis kvar paroladojn en la Berlaymont por SCIC, la EU-interpretadservo, du je 10 minutoj kaj 6 minutoj. Ili bezonis irlandlingvajn paroladojn por trejnado de novaj interpretistoj. Kompreneble mi multe parolis pri niaj ideoj de lingva justeco kaj plibonigado de lingvolernado, sed menciis la vorton Esperanto nur tre ŝpareme en la fina parolado. Poste mi invitis la organizantinon tagmanĝi - ŝi estas tre afabla kaj multlingva grekino, Katerina Dara-Lepoura. Ŝi diris ke ŝi ne komprenis eĉ unu vorton de miaj irlandlingvaj paroladoj, sed ke ili estas klaraj kaj ne rapidaj kaj do idealaj por trejni interpretistojn. Ni multe diskutis pri Esperanto private, kaj mi montris kelkajn gravajn librojn kiel la novan enciklopedion de originala literaturo en Esperanto al ŝi. Ŝi tre miris ke ekzistas tiaj aferoj kaj invitis min fari alian paroladon nur pri Esperanto por survidbendigo! Tion mi intencas baldaŭ fari, kiom eble plej fake.

Seán Ó Riain kaj Maja Tišljär

KOMUNA KONGRESO DUM PENTEKOSTO 2009

GERMANA ESPERANTO-CENTRO / INTERKULTURA CENTRO HERZBERG (ICH), DE-37412 HERZBERG - LA ESPERANTO-URBO - FUNKCIANTA KIEL LKK POR LA KOMUNA KONGRESODE GEA KAJ EEU DUM PENTEKOSTO 2009



Karaj geamikoj de Esperanto,

- 1) La unua aparte favorpreza aliĝperiodo finiĝas je la 30a de novembro 2008. Vi ŝparos, se vi tuj aliĝos.
- 2) Venis jam aliĝoj el 10 landoj. LKK decidis premii la 100-an aliĝinton. Jam nun preskaŭ 100 personoj aliĝis kaj multaj, ekz. grupoj signalis grandan intereson partopreni tiun eksterordinaran eventon (GEK kaj EEU-Kongreso kune) en la speciala Esperanto-medio de la nova oficiala Esperanto-urbo Herzberg. Tio garantios nemalmultajn pozitivajn surprizojn.

Jen kelkaj gravaj informoj:

- a) Okaze de la kongreso okazos granda Esperanto-ekspozicio en la Kavalira Salono de la bela, historia Kastelo Herzberg.
- b) Krome okazos speciala ekspozicio kun raraj Esperanto-kolektaĵoj kaj Esperanto-filatelajoj en la urba biblioteko.
- c) Je tagmezo de la pentekosta dimanĉo ni povos partopreni (eble en belaj kostumoj kaj eble kun diversaj flagoj) en la granda procesio de la urba popolfesto kune kun reprezentantoj de Herzberg - la Esperanto-urbo.



Se vi havas kaj pretas, bv. kunporti nacian kostumon, specialaĵojn, objektojn per kiuj vi povas (per simboloj, ktp.) prezenti vian nacian kulturon. (Ankaŭ unuecaj Esperant-motivaj vestaĵoj, akcesoraĵoj bonvenas.)

- ĉ) Prezentoj dum la internacia vespero bv. baldaŭ anonci vin, indikante ĝenron, temon, daŭron de la programero. Ne forgesu, vi povas prezenti vin ne nur al la kongresanoj sed ankaŭ al la invitita loka publiko.



- d) Plurfoje okazos gvidadoj tra la urbo, en la Kastela Muzeo kaj al la najbarvilaĝa Unukornula Groto.
- e) Multaj esplorindaj kaj fotindaj esperantaĵoj jam nun troviĝas en la urbo.
- f) Dum la kongreso nemalmultaj esperantlingvaj helpantoj estos je via dispono.
- g) En la katolika preĝejo "St. Joseph" okazos ekumena diservo.

- ĝ) Okazos rapid-kursoj por komencantoj por tuja uzo, baza konversacio
- h) Oni multe muzikos, eĉ publike sur la bazara placo ĉe la urbodomo.

i) Favorprezaj hoteloj, feriodomoj, apartamentoj (ĝenerale inter 30-40 eur) estas je via dispono. La prezoj povas esti malpli altaj kaze de komuna luo de feriodomo. Antaŭmendojn vi povas fari indikante la tranoktdeziron ankaŭ per la kongresa retpaĝo: <http://gek-eek.esperanto-urbo.de> , Aliĝo menupunkto. Vi ricevos konfirmilon kaj informojn pri akireblaj tranoktejoj.

j) Por alvenontoj per ruldomoj ni ofertas lokon en la kampadejo en Herzberg/Scharzfeld.

ĵ) Okazos gvidadservo por ne-esperantlingvaj familianoj, akompanantoj. Do ne lasu viajn familianojn hejme.

k) Aparte interesajn ekskursojn ni ofertas al vi, ekz. al fama Eŭropa Rozo-parko en Sangerhausen, al la historia urbo Goslar (estas en la listo de la Mondkulturheredaĵoj), eblecon partopreni en la muzika vespero "Händel-festludoj" en la Kastelo Herzberg, ktp.

La ekskursoj kostos ĉ. 15-20 eŭrojn, en kelkaj kazoj depende de la nombro de kunveturontoj. Bv. indiki via(j)n ekskurscelo(j)n per la formularo trovebla sub Aliĝo en la kongresa hejmpaĝo

l) Multaj famaj prelegantoj jam ofertis interesajn prelegtemojn

m) Dum la kongreso okazos multaj kunsidoj kaj fakaj kunvenoj. Bv. anonci al LKK se vi mendas ĉambron, havas proponon aŭ deziron.

n) La kongresa hejmpaĝo regule informos vin pri novaĵoj, sciindaĵoj:

<http://gek-eek.esperanto-urbo.de>

o) La kongresa retpaĝo estas atingebla ankaŭ rekte de la urba hejmpaĝo de Herzberg

<http://herzberg.de> .

Maldekstre en la listo vi trovas la ligilon: Esperanto-Kongreso.

Se vi havas gravajn demandojn, bv. ne heziti skribi al ni.

Amike kaj samideane salutas

Petro Zilvar kaj Zsafia Korody

LA 34-a KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO EN SABADELL



La 34a Kataluna Kongreso de Esperanto okazos en Sabadell, la 6an, 7an kaj 8an de decembro. Verŝajne ĝi estos la plej riĉa kataluna kongreso ĝis nun pro la kvalito de siaj esperantlingvaj prelegantoj, pro la arta programo, kaj pro la kongresejo kaj alia substruktura helpo fare de la magistrato de Sabadell.

Mi kunsendas la programon kaj la liston de aliĝintoj ĝis la nuna momento. Eĉ se la nombro de partoprenantoj estas rekorda, laŭ mi, mankas pluraj homoj pri kies ĉeesto mi certas, aŭ esperas. Tial, mi petas tiujn kiujn planas veni kaj ankoraŭ ne aliĝis, ĝin fari tuj.

La organiza skipo, laboregas por ke ĉio iru glate, kaj estos ege helpa afero aliĝi kiel eble plej frue. Pliajn informojn kaj retan aliĝon vi trovos ĉe <http://www.esperanto.cat/kongresoj/2008/>

Farri

LA KVINA EŬROPA SOCIA FORUMO KUN DEMANDOJ POR ESPERANTISTOJ

Inter la 17a kaj 21a de septembro okazis en Malmö la kvina Eŭropa Socia Forumo (ESF) kun ĉirkaŭ 16.000 registritaj partoprenantoj, ĉefe reprezentantoj de civilaj organizaĵoj, kiujn maltrankviligas la tutmondigo de novliberalaj politikaj kaj ekonomiaj procedoj, kiuj per detruo de la biosfero nuntempe jam endanĝerigas la vivpotencojn de la homaro mem.

La Forumo daŭris kvin tagojn, kaj de ĝia ekesto elformiĝis bonkutima procedo: ĉiam merkrede estas solena malfermo de la Forumo, de ĵaŭdo ĝis sabata tagmezo okazas plenkunsidoj, seminarioj kaj laborejoj pri politikaj kaj fakaj temoj, sabate posttagmeze okazas granda, festivalforma manifestacio de la partoprenantaj civilaj organizaĵoj kaj lokaj simpatiantoj sub la slogano de la Forumo (ĉi-foje: „Alia mondo eblas”). Krom tio dum ĉiuj Forumoj okazas tre riĉaj kulturaj eventoj: subĉielaj kaj internaj koncertoj, ekspozicioj de artaĵoj, filmprogramoj ktp., kiuj estas grandparte senpagaj por la partoprenantoj. Dum la Forumoj la partoprenantaj civilaj organizaĵoj havas eblecon lupreni standon, ĉe kiu eblas interparoladi kun la preterirantaj partoprenantoj, disdoni propagandilojn ktp.

En Malmö la plenkunsidoj estis forigitaj, anstataŭe seminarioj kaj laborejoj estis preferataj, ĉar en tiuj la partoprenantoj havis plian eblecon por libera diskutado. Pro la multeco de temoj kaj parolantoj, la fakaj programoj en Malmö plilongiĝis: ili daŭris ankaŭ dimanĉon matene. Pli ol 200 politikaj kaj fakaj programoj estis akumulitaj en 10 temgrupoj (sociaj rajtoj, akirebleco de publikaj servoj, daŭropova evoluo, politikaj, ekonomiaj kaj kulturaj alternativoj, kontraŭrasismo, kontraŭmilitismo, konstruo de nova Eŭropo ktp.). Oni devas ankaŭ konstati, ke laŭ la riĉeco de kulturaj programoj la Malmöa Forumo superis ĉiujn antaŭajn Forumojn, kaj la tuta evento de la Forumo estis por la partoprenantoj neforgesebla travivaĵo.

La foruma programo estis iomete perturbita per certaj radikalaj grupetoj dum la sabata manifestacio, sed karakterize la medioj dediĉis al tiu afereto pli da atento ol al ĉiuj aliaj eventoj de la Forumo.

Mi intencas nun tuŝi alian problemkomplekson, kiu estas ligita kun la agado de esperantistoj: la komunikan situacion dum la Forumo kaj la solvojn, per kiuj la svedaj organizantoj klopodis ebligi aŭ faciligi la komunikadon inter ĝiaj diverslingvaj partoprenintoj.

La organizantoj klopodis ebligi, ke ĉiu povu paroli en sia gepatra lingvo, ĉar estis plene konsciis la lingvajn problemojn en tia multlingva foruma komunumo, kaj ankaŭ komprenis la malavantaĝan situacion de la parolantoj de la t.n. „malpli uzataj” lingvoj. Tamen tiu bela kaj respektinda intenco praktike ne portis bonaj rezultojn, eĉ oni povas diri, fojfoje ĝenegis la ekestinta komunika kaoso. La interpretistoj-volontuloj parte ne ĉiam havis sufiĉan sperton en samtempa tradukado aŭ ne havis sperton en tio, kiel laŭte kaj artikule oni devas paroli por komprenigi sin, parte ne ĉiam ili sciis ĝuste tiun lingvon en kiun oni devis traduki. Tial ofte estis neceso pri duobla traduko: unue en iun „mondlingvon”, due en la bezonatan „malpli uzatan” lingvon. Estas konate, ke en tiaj kazoj eĉ inter 30 kaj 60 % de la senco povas foriĝi. Tio ofte kuniĝis kun organizaj problemoj: tio, el kiuj lingvoj oni devas traduki al kiuj lingvoj iĝis klara nur surloke dum la seminarioj, kaj pro tio la komenco de la programo ofte malfruis. Se la parolantoj de iu lingvo konsistas nur el malmultaj homoj, la tradukisto sidiĝis inter ili, kaj flustris al ili, kio foje tamen estis ĝenanta al la aliajn. Oni povas ĝenerale konstati, ke malpli da

problemoj okazis, kiam ĉiuj partoprenantoj parolis komunan lingvon, kaj tiu lingvo bedaŭrinde plej ofte, sed en la nuna situacio kompreneble, estis la angla.

Esperantistoj partoprenis en la Forumo, sed ilia ĉeesto ne estis sufiĉe sentebla. Ili havis standeton en unu de la plej frekventataj centroj de la Forumo, en Folketspark. Ili ankaŭ havis unu (duontempan¹) seminarion, kie Seán Ó Riain, irlanda diplomato kaj esperantisto havis tre interesan prelegon, sed en la multeco de aliaj programoj tiuj ne altiris sufiĉan atenton. Seán prelegis pri la temo, kial Esperanto estus la plej bona solvo por internaciaj lingvaj problemoj. Li parolis pri la grandegaj kostoj, kiujn EU povus ŝpari per Esperanto, pri la malegalaj pozicioj por diversaj nacioj, li ankaŭ menciis la danĝerojn de tiu situacio por ĉiuj lingvoj krom la angla kaj por la kultura identeco de Eŭropo. La titolo de lia prelego estis: Interkultura dialogo en globala mondo?².

Alia preleganto, kiu parolis pri egalrajteco en komunikado, estis mi. Mi sukcesis aliĝi al seminario, kiun organizis neesperantistoj, nome reprezentantoj de nacioj kun etnaj, kulturaj kaj politikaj malavantaĝoj: eŭskoj, katalanoj, kurdoj. Por ili mia temo estis interesa. En mia parolo mi sekvis tiun penslinion, kiu ne estas nekonata por Esperantistoj, sed devas esti disvastigata inter homoj, kiuj ankoraŭ tute ne perceptas la kulturajn, eĉ politikajn kaj ekonomiajn danĝerojn de disvastiĝo de la angla, kiel ĝenerala ilo de komunikado. En mia prelego mi vojaĝigis la aŭskultantojn de la ĝeneralaj problemoj de komunika diskriminado tra la malavantaĝoj de la parolantoj de t.n. „malpli uzataj” lingvoj kaj la bezono de unu, neŭtrala internacia lingvo ĝis la konstato, ke tiun funkcion nuntempe povas plenumi sole Esperanto. Mi ankaŭ tuŝis la problemon, kial ne povas Esperanto trarompi la murojn de relativa malsukceso³.

Karakterize pri la stato de aferoj, ni ambaŭ, kiuj parolis pri la neceso de Esperanto, parolis angle! Tiu fakto kune kun la tre malforta ĉeesto de Esperantistoj en la Forumo plej klare atentigas pri la urĝa neceso pli efike agi. Jen vasta komunumo de miloj da homoj, kiuj fervore serĉas direktojn kaj vojojn, per kiuj nia homa societo povus esti pli egalrajta, pli vivebla. Al la kadro de ilia serĉado sendube apartenas ankaŭ la afero de lingva egalrajteco. Se ni, esperantistoj nek klopodas nek sukcesas konvinki pri la utileco kaj funkcieblo de Esperanto tiun grandan komunumon de homoj, pli malpli malfermitan al novaj pensmanieroj kaj raciaj solvoj, kiel ni povas esperi, ke ni povos konvinki homojn sur tre malfacilaj terenoj?

Pro tiu kaŭzo kaj ankaŭ por la ekzerco kaj evoluigo de niaj spiritaj kapabloj, neevitebla tasko de ni, esperantistoj estu ĉeestadi ĉiufoje en la Forumo. Oni aŭdu pli forte nian voĉon, ni pensigu, konvinku kiel eble plej multajn homojn pri la justeco de nia idealo. Tiu ŝanco en Malmö estis nur malmulte eluzita, sed antaŭ ni estas la sekva Forumo en Istanbul en la jaro 2010. Ni denove havas du jarojn por la preparoj. Tio estas kaj multe kaj malmulte da tempo, kaj ni devus tuj komenci la pripensadon kaj planadon, ankaŭ la organizadon de homoj, de grupoj, kiuj havas intereson kaj volon agi pri tiu ĉi afero.

La demando estas: ĉu ni povos demonstri la forton de niaj ideoj? Ĉu ni estos tre efikaj en Istanbul?

Veronika Heé

¹ La plentempaj seminarioj dauris tri horojn generale kun 3-5 parolantoj kaj sufiĉe da tempo por debato, sed pro la multeco da temoj kaj parolantoj oni ankau dividis tiun tempon inter du temgrupoj.

² Intercultural Dialogue in a Global World?

³ La teksto de mia malmöa prelego kun la titolo Linguistic rights - equality in communication, equality in international (interethnic) communication en Word-a kaj ankau en PowerPoint-a formato estas legebla en mia hejmopago www.heev.princzb.hu

SEMAJNO DE KULTURO INTERNACIA



Inter la 18-a kaj la 25-a de septembro mi partoprenis Semajnon de kulturo internacia en San Giuliano Terme apud Pizo en Italio.

La aranĝon partoprenis dudeko de homoj el Italio, Francio, Rumanio, Slovakio, Hungario, Aŭstrio, Brazilo, Belgio, Vjetnamo kaj Slovenio.

La plano estis viziti kelkajn lernejojn kaj al lernantoj deversajaj montri pecon de kulturo de la lando de kie venas partoprenantoj. Niaj italaj amikoj entuziasme tradukis niajn esperantlingv

ajn prezentadojn al la itala. Estis interese por ni vidi italajn lernejojn kaj sperti intereson de lernantoj. Ili havis multajn demandojn kaj pri niaj landoj kaj pri Esperanto mem. Partoprenantoj preparis siajn prezentadojn ege diverse. La gelernantoj povis aŭdi kantojn kaj alispecajn muzikaĵojn, vidi popolajn kostumojn, ludi ludojn kiujn ili ne konis, aŭskulti pri geografio, historio, lingvoj kaj kulturoj alilandaj.


Dum la semajno eblis vidi multajn interesaĵojn kaj foti, de nia vidpunkto nekutimaĵojn de vizitita regiono.

Ideo de Brunetto Casini kiun realigis Itala Esperanto

Junularo estas bona, kaj indas fari similajn aferojn en aliaj landoj, eble eĉ fari reton de similaj aranĝoj en Eŭropo. La aranĝo povus esti eĉ multe pli sukcesa, se la organiza teamo havus pliajn eblojn influi al la programo. Ĉar la aranĝon financis la ok lokaj komunumoj, IEJ ne povis multe decidi mem. Do espereble en la sekvaj provoj ilia bonidea aranĝo estos pli bona.

Dum la semajno ni multe lernis pri Italio kaj italoj kaj ke ne ĉiuj niaj antaŭjuĝoj estas maltrafaj.

Dankon al niaj italaj amikoj.



Vesna Obradović

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 27-an de novembro 2008.

Redaktoro: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljar, Seán O'Riain, Normando Fleury, Veronika Heé, Maja Tišljar, Petro Zilvar, Zsafia Korody, Farri, Renato Corsetti kaj Vesna Obradović

Kontakto: vesna.obradovic@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>, www.europano.eu



Kun-financata de Eŭropa Unio kadre de la programo "Eŭropo por Civitanoj" 2007 – 2013.